# Eŭropa Bulteno

Decembro 2018, Numero 187

## NOVJARE



Ni troviĝas ĉe la fino de la dua jardeko en tiu ĉi jarcento kiu estas signata per la informadika erao. La homaro pli ol iam ajn rapidege ŝanĝiĝadas. Neniu plu povas eĉ imagi kiel strategii por iu proksima, des malpli iom pli fora estonto. Valoroj laŭ kiuj ni vivis dum pli ol duonjarcento – kontraŭfaŝismo, malnacismo, kontraŭdiktatoreco, homaj rajtoj – estas iom post iom forigataj. Ŝajne la periodon de post la dua mondmilito, kiu alportis la menciitajn valorojn, komencas anstataŭi nova erao, kies idealoj iĝas ĉiam pli kontraŭaj. Ĉu atendas nin denove naciaj egoismoj kaj malamoj, konkerapetitoj kaj militegoj?

Kiel ni stiru la E-movadon en tiu ŝtorma erao? La movadon kiu reklamas pacon, kaj la paco estas ne plu populara.

Pli longdaŭre ne eblas antaŭvidi kiel adapti nin al tiu nova tempo. Tial ni en EU vidu kion volas Eŭropa Unio en la sekvaj kelkaj jaroj. Ekde 2010 ekregos nova sepjara financperiodo en

kiu pro Brita foresto la enspezoj esence malpligrandiĝos kaj la ŝancoj por subvencio al projektoj rilataj al Esperanto grave malpligrandiĝos. EEU lastatempe ĉefe financas sin el eŭropaj fontoj kaj do por ni ne estas bona perspektivo el finanaca vidpunkto.

Tamen ni havas vizion por 2019. Neniam antaŭe la E-movado havis bonajn rilatojn kun politikisto de tiel alta rango kiel ni havas nun kun komisionano de Eŭropa Komisiono V. Andriukaitis. Kaj li pretas helpi la movadon, sed montgriĝis ke tiu helpo estas ege limigita. Niaj iluzioj pri grandiozaj celoj nuliĝis, sed tamen restis realeca plano. En 2019 devas finiĝi la eŭrop-financata projekto Multlingva Akcelilo – kiu celas helpi la eŭropajn lernejojn per speciala enkonduka unujara lernobjekto gravan plirapidigon en instruado de fremdlingvoj. Jam en la nuna fazo videblas ke ĉi tiu projekto sukcesas multe pli ol ni mem esperis. Tial EEU organizas en tiu ĉi jaro sian Eŭropan Konferencon kadre de Itala E-Kongreso kiu prezentos la rezultojn de la projekto kaj ties gravecon por EU. Partoprenos ankaŭ komisionano V. Andriukaitis kaj ni esperas ke li sukcesos konvinki ankaŭ komisionanon Navracsics, taskigiton pri edukaj aferoj de EU, veni. Tio ebligos multe pli vastan lanĉon de la projektrezultoj kaj ŝancon ricevi novan, kompletigan projekton kaj ties financadon dum postaj tri jaroj, kiu celos montri verajn rezultojn se oni aplikas la novan lernobjekton Multlingvan Akcelilon.

Post tio estos malfermita oficiala vojo por enkonduki Multlingvan Akcelilon (alivorte parton de Esperanto) en eŭropajn lernejojn. Tial ni en EEU estas tre ĝojaj kaj optimismaj pri la estonto de Esperanto en EU por la sekvaj 4-5 jaroj.

Tial optimisman jaron al la Eŭropaj Esperantistoj.

Zlatko Tišljar

# 86-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

**Kial viziti Italan Kongreson de Esperanto?**
Pli kaj pli legiĝas rete, revue aŭ gazete, radie, Vizaĝlibre, ke malindas ne partopreni en iu itala kongreso….. Multaj laŭdoj, malmultaj kritikoj aperas tie kaj ĉi tie, eldiritaj de neitalaj kongresanoj ĵus revenintaj hejmen post iu evento en tiu ĉi lando.

Mi mem en ĉi lastaj jaroj ree komencis ĉeesti la naciajn kongresojn, kiuj mirigis min per daŭraj surprizoj kaj – plej grave – donis al mi la eblon ĝui intense ĉiujn erojn de interesega programo. Tiu ĉi tuŝis variajn aspektojn kulturajn per altnivelaj prelegoj aŭ seminarioj, zorge de eminentaj fakuloj, kursoj baza kaj progresiga fare de kompetentaj instruistoj, ekskursoj kiuj, konatigante la kongresan urbon kaj ĝian teritorion, malkovrigas juvelojn artajn kaj naturajn, kaj ĉefe historiajn, kiuj ofte kaŝiĝas antaŭ normala turisto. Kaj ne laste, pro sia indeco, la ĉiuvesperaj okazaĵoj - kiuj mirigas ne nur la eksterlandanojn sed ankaŭ la italojn mem per prezentadoj muzikaj, klasikmuzikaj aŭ folkloraj – enigantaj la spektantaron rekte en la spiriton kaj mondon de la artistoj.

Do, estas la momento por decidi, ĉu ankaŭ vi partoprenu la 86an Italan Kongreson de Esperanto, kiu okazos de la 24a ĝis la 31a de aŭgusto 2019. Sed kie? En la nord-orienta parto de Italio, en regiono Friulo Julia Venetio, en la urbo Trieste.

**Sed kial veni al Triesto?**
Tute ne eblas listigi ĉiujn kialojn por aliri ĝin, sed koncize estos klarigitaj kelkaj punktoj. Nepre mi prezentu al vi la kongresejon en kiu disvolviĝos la kongresa programo:



**Savola Excelsior Palace** fronte al la maro, je kelkaj paŝoj al la urbocentro. Konstruita en 1911 de la aŭstra arkitekto Ladislaus Fiedler, ĝia fasado estas ornamita per novklasikaj skulptaĵoj kaj kolonoj. En la momento de sia malfermo en 1912, la hotelo estis unu el la plej imponaj kaj luksaj en la Aŭstra-Hungara Imperio. Laŭlonge de sia historio, ĝi gastigis aristokratojn, artistojn kaj diplomatojn, same kiel turistojn vizitantajn Trieston. Imperiestro Franz Josef estis ofta gasto kaj ankoraŭ nun ekzistas lia privata apartamento, bone konservita. Plej laste la hotelo estis finrenovigita je junio 2009.

Ĉu ni parolu nun pri la programo? Ĝi ne estas ankoraŭ tute kompletigita, tamen menciindas kelkaj detaloj. La kongresa ĉeftemo de la kongreso estas: Multkulturismo kaj plurlingvismo hodiaŭ. Ĉirkaŭ ĝi disvolviĝos diversaj prezentotaj prelegoj. Lige al ĝi kaj plenkongrue oni pridiskutos pri: "La heredaĵo de *Leonardo da Vinci* post 500 jaroj de lia morto". Kiel sciate oni celebros en 2019 tra la tuta mondo tiun ĉi eklektikan geniulon kaj do, ankaŭ ni esperantistoj deziras omaĝi tiun ĉi grandan homon.

Al la laboroj de la itala kongreso kontribuos tre aktive kaj interese ankaŭ Eŭropa Esperanto-Unio, kies membroj prezentos serion da 5 prelegoj rilataj al "Instruada Politiko de fremdaj lingvoj ene de Eŭropa Unio". Ĉefa referanto estos la Komisionano de Eŭropa Unio Vytenis Andriukaitis, Litovio. Alia prelegantoj pri la sama temo estos: Dr. Seán Ó Riain - diplomato de Irlanda Respubliko, mag. Zlatko Tišljar, ing. Jozef Reinvart - diplomato de Slovakio kaj d-ino Angela Tellier.

Sed kongreso ne nur signifas: labori, studi, cerbumi, kleriĝi: ja dum ĝi oni ankaŭ distriĝos, spektante koncertojn, teatraĵojn, ... kaj ekskursante!

Estas preparataj vizitoj de diversaj cellokoj tre allogaj, interesaj kaj artaj. Unue vi ekkonos la urbon pere de profesiaj ĉiĉeronoj, kiuj akompanos vin tra 3 diversaj itineroj: pri Novstila arkitekturo, antikvaj rezidejoj, diverskultaj preĝejoj. Poste en la provinco okazos ekskursoj al kasteloj de *Miramar* kaj *Duino*; tra la altebenaĵo Karsta; al ĉemara venecistila urbeto Muggia; kaj... aŭdu, aŭdu: ni pretas eĉ kontentigi unuopulajn postulojn, sed tio ĉi nur post la fino de la kongreso, kompreneble!

Do, oni organizos ekskursojn duontagajn kaj tuttagajn, distribuitaj ene de la semajno.
Kiuj estos la vizitceloj en la regiono? Gorizia [elp. Goricja], kiu fascinos vin pro sia historio kaj imponaj kastelo kaj palacoj. Gemona kaj Venzone [elp. Ĝemona kaj Vencone], juveloj situantaj inter ravaj montaj pejzaĝoj kaj riveraj valoj, kiuj suferis detruigajn tertremojn en



1976 sed estis rekonstruitaj, respektoplene de iliaj antaŭaj aspektoj. Cividale del Friuli [elp. Ĉividale de Friulo], tie ni sekvos la spurojn de Longobardoj. Grado, eta urbo ĉe la maro, la tiel nomata "Suna insulo", kies plano rememorigas Venecion.

Sed mi ne deziras jam nun ĉion malkaŝi, iom-post-iome vi mem malkovru, kial indas partopreni en la 86a Itala Kongreso de Esperanto en Triesto, de la 24a ĝis la 31a de aŭgusto kaj nepre vizitu la ttt-ejon prikongresan ĉe la adreso: kongreso.esperanto.it, kaj ... tuj aliĝu, por rezervi vian sidlokon en la belegaj salonoj de la kongresejo Savoia Excelsior Palace, kaj por mendi vian hotelĉambron laŭeble plej baldaŭ por eviti maltrafi tiun kiun vi preferus.
Ĝis la venonta!

Elda Doerfler

# POLIGLOTOJ KONFERENCIS EN LJUBLJANA

Renkontiĝoj de plurlingvemuloj (poliglotoj) iĝas pli kaj pli popularaj. La unua, kiu komencis la tradicion de ĉiujara renkontiĝo de homoj, kiuj ŝatas aŭ eĉ amas lerni diversajn lingvojn, estas Poliglota Konferenco (Polyglot Conference). Ĝin fondis kaj organizas du famaj poliglotoj: Richard Simcott kaj Alex Rawlings. La konferenco okazas ĉiujare en alia lando, simile al nia Universala Kongreso. Ĉi-jare ĝi okazis la 26-28an de oktobro en la ĉefurbo de Slovenio, Ljubljano kun ĉ. 350-400 partoprenantoj.

La evento estis bunta je prilingvaj prelegoj kaj "uzinoj". De vendredo ĝis dimanĉo oni diskutis diversajn lingvo-rilatajn temojn, prelegis, instruis. La konferencon ĉefprizorgas eble la plej fama nuntempa poligloto Richard Simcott, brito loĝanta en Makedonio, kiu kapablas komuniki en 30-35 lingvoj, ankaŭ en tre bona Esperanto!

Ege agrabla surprizo estis la relative granda spaco, dediĉita al Esperanto. Okazis unu prelego pri la lingvo kaj du uzinoj. Krome haveblis riĉa Esperanta libroservo, kiun mi disponigis surloke. La prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio Seán Ó Riain prelegis pri "Lingvo Akcelilo: priskribo de pionira lingvolerna projekto" (pri ĉi-projekto vidu apartan artikolon en ĉi-numero de La Ondo, p. 32-33). Judith Meyer gvidis kurson por komencantoj "Fenestro en Esperanton". Mi mem gvidis la kurson de Esperanto por progresantoj. Judith Meyer surloke subskribadis la nove eldonitan lernolibron de Esperanto por anglalingvanoj Complete Esperanto de la fama eldonejo Teach yourself, kiun ŝi kunaŭtoris kun Tim Owen.

Estas tre bone, ke Esperanto estu pli kaj pli videbla en ĉi-specaj eventoj. Ja poliglotoj estas homoj tre proksimaj al nia movado laŭ la malfermiteco, scivolemo kaj lernemo, do ili estas bonaj aliancanoj por ni, kaj multaj el ili lernas Esperanton kaj iĝas aktivaj en la movado. Indas mencii, ke danke al la Poliglota Konferenco naskiĝis du aliaj: LangFest en Montrealo kaj Polyglot Gathering en Berlino. En ambaŭ estas envolvitaj esperantistoj, kaj Polyglot Gathering (Poliglota Kunveno) eĉ estis fondita kaj gvidata de esperantistoj. Dum la tri lastaj jaroj ĝin organizas la teamo de E@I en Bratislavo. Tiel ĉi esperantistoj kontribuas al lingva diverseco, prilingvaj diskutoj kaj samtempe varbas por Esperanto. La Poliglota Kunveno nun estas la plej granda renkontiĝo de plurlingvemuloj en la mondo – kaj eble parte pro tio, ke ĝi iom imitis la programon de Esperanto-renkontiĝoj kaj adaptis ĝin por la poliglota publiko. Se vi emas iam viziti iun el la grandaj renkontiĝoj de poliglotoj, vi havas plurajn eblojn: fine de majo 2019 okazos la Poliglota Kunveno en Slovakio, en aŭgusto LangFest en Kanado kaj en oktobro la Poliglota Konferenco en Japanio.

Konklude
Malgraŭ la malkresko de la membraroj en plejparto de la Esperanto-organizoj ja ekzistas interesiĝo pri Esperanto – eĉ se oni devas pli malfacile (kaj alimaniere) serĉi la interesiĝantojn por ĝi. Unu el taŭgaj lokoj, kie tiaj homoj troviĝas abunde, estas diversaj renkontiĝoj de poliglotoj – kaj, kiel organizanto de la Poliglota Kunveno kaj kiel partoprenanto de la Poliglota Konferenco, mi rekomendas aktive partopreni ĉi-specajn aranĝojn kaj uzi la eblon informi pri "nia lingvo" al tiuj, kiuj efektive amas lerni lingvojn.
Pli da informoj (angle): http://polyglotconference.com

Peter Baláž (Petro), E@I-kunordiganto
Ĉi tiu artikolo aperis en la decembra numero de La Ondo de Esperanto

# VYTENIS ANRIUKAITIS SUBTENAS LA 55-AN BET

La 29an de oktobro 2018 membro de Eŭropa Komisiono (Eŭrokomisaro) Vytenis Andriukaitis en la reprezentejo de Eŭropa komisiono en Vilno akceptis la prezidanton de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas. Krom kelkaj aliaj aferoj de la Esperanto-movado estis priparolitaj la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55), okazontaj la 6-14-an de julio 2019 en Panevėžys. Andriukaitis konsentis subteni ĉi tiun gravan esperantistan aranĝon. Se la cirkonstancoj permesos, li persone partoprenos la solenan inaŭguron de BET-55 kaj faros paroladon en Esperanto.

Vytenis Andriukaitis nun estas la plej altranga politikisto, kiu mem estante esperantisto aktive subtenas la Esperanto-movadon en Eŭropo. Li lernis Esperanton en 1976, kiam li laboris kiel kirurgo en hospitalo de la urbo Ignalina, proksime de Vilno. Foje li rakontis, ke dum noktaj deĵoroj en la hospitalo, kiam mankis konkreta laboro, li aŭtodidakte studis Esperanton. Tio estis lia protesto kontraŭ la rusigado de ĉiuj vivoflankoj de Litovio en Sovetunio. Al Esperanto lin logis Viktoras Kutorga (1920-1991), medicinisto, esperantisto kaj konvinkita socialdemokrato.

De tiam Vytenis Andriukaitis sufiĉe diligente vizitadis ĉiusemajnajn kunvenojn de Vilna Esperanto-klubo, gvidata ankaŭ de medicinisto kaj elstara esperantisto Adomas Vaitilavičius (1915-1996). Poste, dum la aktiva agado por sendependeco de Litovio li iĝis tre aktiva

socialdemokrato kaj iom deflankiĝis de Esperanto, tamen li neniam forgesis ĝin kaj, kiam li povis, helpis la esperantistojn.



Vytenis Povilas Andriukaitis naskiĝis en 1951 en Siberia ekzilo, al Litovio lia familio revenis en 1958. Dum 1969-1975 li studis medicinon en Kaŭna Medicina Instituto, dum 1979-1984 en Vilna universitato li foreste studis historion; laboris kiel kirurgo en Ignalina, Kaŭno kaj Vilno. Andriukaitis aktive partoprenis en la kontraŭsovetia sendependiga movado de Litovio, unue kaŝe, poste oficiale. En 1990 li estis elektita kiel parlamentano de Litovio, kaj restis parlamentano ĝis septembro 2014 (escepte de 2004-2008), dum 2000-2004 li estis vicprezidanto de la Litovia parlamento. De 2012 ĝis 2014 li estis ministro pri sanprotektado de Litovio. En 1999-2001 li estis prezidanto de Litovia Socialdemokrata Partio.

Ekde 2014 li estas membro de Eŭropa Komisiono, kiel reprezentanto de Litovio. En la Eŭropa Komisiono (la registaro de Eŭropo), li respondecas pri sano kaj sekureco de nutraĵoj. Litovia Socialdemokrata Partio kandidatigis lin por la posteno de la prezidento de Litovio. La elektoj okazos sekvontjare en junio.

Dum lia laboro en la parlamento mi kelkfoje renkontiĝis kun li, ĉefe pro la organizaj aferoj de la 90a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno (2005). En 1996 li kun du aliaj parlamentanoj, esperantistoj Mečislovas Treinys (1941-2008) kaj Antanas Račas (1940-2014) akceptis la prezidanton de UEA prof. Lee Chong-Yeong (1932-2008). En 1998 dum BET-34 en Veisiejai li, kiel parlamentano, partoprenis la inaŭguron de la impona monumento al Ludoviko Zamenhof.

Krom en Esperanto kaj en la litova, Andriukaitis parolas pole, angle, ruse kaj germane. Li estas edziĝinta kaj havas tri infanojn. Li estas dekorita per kelkaj gravaj ordenoj kaj medaloj. Laborante en Eŭropa Komisiono, Andriukaitis helpe de mi kontaktis gvidantojn de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj jam dum kelkaj jaroj kun ili fruktodone kunlaboras.

En 2016 li partoprenis en la lingvo-politika konferenco "Perspektivoj de lingva komunikado en Eŭropa Unio", okazinta en Nitra (Slovakio) samtempe kun la 101a UK, kaj faris ĉefparoladon en Esperanto. En sia parolado li nomis Esperanton simbolo de humanismo kaj demokratio. En 2017 li partoprenis en la komuna kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio kaj Germana Esperanto-Asocio en Freiburg (Germanio) kaj ankaŭ tie faris ĉefparoladon en Esperanto "Zamenhof kiel antaŭulo de homaj rajtoj". En ambaŭ paroladoj Vytenis Andriukaitis emfazis la rolon de Esperanto en konservado de paco kaj en problemaro de homaj rajtoj. Liaj paroladoj en Esperanto iĝis la unuaj Esperanto-tekstoj, aperintaj en la

oficiala retejo de Eŭropa Komisiono. Tiuj paroladoj aperis ankaŭ en la angla, franca kaj germana lingvoj.

En 2017 al Vytenis Andriukaitis estis atribuita honora membreco en EEU. En la 103a Universala Kongreso de Esperanto (Lisbono, 2018) la Komitato de UEA elektis lin membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Reprezentanto de Litovio la unuan fojon aperas en tiom alta honora pozicio de UEA.

Povilas Jegorovas

## SUKCESA ESPERANTO-INFORMADO EN LA LERNEJOJ DE LA POLA Nowy Sącz



La 28-an kaj 29-an de novembro en la sud-pola urbo Nowy Sącz, nia redaktoro, Katalin Kovats okazigis du publikajn informlecionojn en la loka Altlernejo de Fremdaj Lingvoj. La lecionojn partoprenis cento da studentoj, kune kun pluraj instruistoj kaj gvidantoj de la koncernaj fakultatoj. La prezentaĵoj daŭris po 90 minutojn, ĉio okazis laŭ la rekta metodo. La studentoj en formo de rekta leciono ricevis trarigardon pri la bazaj funkcioj de la lingvo kaj post la malgrandaj ŝtupoj de la kurso havis okazon en dialogoj apliki tuj la lernitaĵojn. La lecionoj disvolviĝis en tre bona etoso kun multaj ridoj kaj amuzaĵoj.




Por la studentoj estis interese ankaŭ tion observi kiel eblas de nulo lerni lingvon sen helplingvo. La sukceson de la prezentoj indikas, ke la direktorino Monika Madej-Cetnarowska ankaŭ estonte bonvenigas Esperanto-lecionojn kaj invitis Katalin iam ajn reveni kaj instrui denove. Ŝi kunlaboros por plia disvastigo de la internacia lingvo en la instituto, je kio estas bona oportuno, ĉar samloke studas Lidia Komar, kiu kun sia avino, Halina Komar, tutmonde konata esperantisto, preparis la prezenton kaj kune kun sia loka klubo povos prizorgi pluan agadon en la altlernejo

Paralele kun tiu programo en la sama urbo turneis alia konata esperantisto, Roman Dobrzyński el Varsovio, kiu en mezlernejoj kaj lokaj kluboj kaj societoj per pollingva prelego

pri la pola himno kontribuis al la tutlanda festoprogramoj omaĝe al la centjariĝo de Pollando. La 29-an la lokanoj kune festis la sukcesan finon de sia alia ERASMUS+ projekto, kiun ili efektivigis kun la litovaj partneroj kaj pri kies spertoj kaj travivaĵoj oni havis okazon spekti la belegan resumfilmon de Roman Dobrzyński.



Samfeste Katalin Kovats transdonis ankaŭ KER-atestilojn. Ĉeestis 7 polaj esperantistoj el inter la 9 sukcesintoj en la somera slovakia KER-sesio.

Danke al la ERASMUS+ projekto la sukcesintoj kune kun germanaj kaj slovakaj partneroj studis intense la lingvon kaj trejniĝis por esti Esperanto-aktivuloj. La kluban feston ĉeestis la direktoroj kaj vicdirektoroj de la mez- kaj altlernejoj, kie Katalin Kovats kaj Roman Dobrzyński antaŭe prezentis siajn programojn. Ilia ĉeesto pruvis, ke la prelegoj kaj provlecionoj vere estis aprecataj kaj la aŭtoritatoj montris intereson pri Esperanto kaj la loka agado de esperantistoj.

Katalin Kovats

## KURSO EN LA PLEJ GRANDA UNIVERSITATO DE HISPANIO

En novembro komenciĝis oficiala kurso de Esperanto en la plej granda universitato en Hispanio, laŭ nombro de studentoj (pli ol 250.000), la Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (UNED laŭ la siglo en hispana lingvo). Esperanto aldoniĝis ĉijare al la propono de lingvoj instruataj en ties centro CUID (Universitata Bita kaj Neĉeesta Lingvo-Centro).

En majo Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj UNED subskribis oficialan interkonsenton, per kiu la kurso de Esperanto estos instruata per neĉeestaj rimedoj en la retejo de la UNED, kun oficialaj ekzamenoj kaj oficiala agnosko. CUID-UNED zorgas pri la kunvoko kaj disvolvo de la kursoj, dum HEF kunlaboras i.a. rilate al la selektado de la homoj kiuj okupiĝos pri ĝi, kunordigo, pretigado de materialo kaj instruado.

La kunordiganto de la kurso estas Manuel Pancorbo, profesoro pri Fiziko de la UNED kaj ano de Hispana Esperanto-Federacio. La instruiston selektis UNED, laŭ propraj kriterioj, kunlabore kun HEF. Dum tiu ĉi jaro pri la kurso zorgos Félix Jiménez Lobo.

La kurso komenciĝis en novembro, kaj daŭros dum la akademia jaro 2018-2019. La kurso havas oficialan karakteron, kaj dum tiu ĉi jaro havigos al ĉiuj studentoj ĝin sukcesontaj la diplomon de la nivelo A2 laŭ la Eŭropa Referenckadro. Je la fino de la periodo de enskribiĝo, 50 homoj pagis la kotizon kaj komencis la studadon.

UNED estas prestiĝa universitato, kun sidejo ne nur en Hispanio, sed ankaŭ en aliaj urboj de la mondo, plejparte en hispanlingvaj landoj de Ameriko. Eblas studi en propra hejmo kaj ekzameniĝi en la koncernaj asociaj centroj.



UNED multe engaĝiĝis kun Esperanto dum tiuj ĉi monatoj, inter alie per la gastigado de la plejparto de la kongreso de ILEI en Madrido en julio. La oficialan inaŭguron de la Kongreso prezidis la vicrektorino pri esplorado kaj internaciigo, Esther Souto, kiu alparolis la kongresanojn per tre varmaj vortoj, inter kiuj kelkaj en Esperanto. Alia profesoro de la Fakultato de Filologio, Nuria Polo, kunprezidis la Simpozion pri "La kultura heredaĵo de Esperanto" organizita ene de la Kongreso, en kiu prelegis interalie ankaŭ la direktorino de la centro CUID, Silvia Barreiro. Krome, en la retejo de la UNED eblas trovi diversajn materialojn pri la Universitato, la kurso, la kongreso kaj Esperanto ĝenerale. Ankaŭ en novembro la madrida sidejo de UNED gastigis prelegon de la prezidanto de HEF pri historio de Esperanto dum la 30aj kaj 40aj jaroj en Hispanio.

Ni esperas ke la kunlaboro daŭros en la estonto, kaj ke en sinsekvaj jaroj eblos daŭrigi la instruadon je la pli altaj niveloj.

José Antonio del Barrio

# ZAMENHOFTAGO PRIFESTATA

## EN VIENO

La Prezidanto de EEU, D-ro Seán Ó Riain faris la unuan paroladon de la Zamenhofa festo en la Pola Instituto en Vieno la 8an de decembro 2018. Tiu evento fariĝis ĉiujara, kaj ĝi montras la oficialan subtenon de Pollando al Esperanto kaj al la memoro de Zamenhof. La Prezidanto parolis duonhore, germane, kun resumoj en la pola kaj en Esperanto. Ĉeestis ĉirkau 80 homoj, kiuj plenigis la salonon, kaj la Direktoro de la Pola Instituto diris publike ke li tre ĝojas ke venis tiom da homoj, kaj ke estas la fina evento de eventoplena jaro kiam ili festis la centjariĝon de pola sendependeco.

La parolado centris je la 70jariĝo de la Universala Deklaro pri Homoj Rajtoj, adopita fare de UN en Parizo la 10-an de decembro 1949, kaj substrekis la blindecon de UN al lingvaj rajtoj. La Deklaro malpermesas ian ajn diskriminacion, ankaŭ je lingvo, sed UN agnoskas nur ses oficialajn lingvojn: la angla, la araba, la ĉina, la franca, la hispana kaj la rusa. Tiujn ses lingvajn parolas denaske proksimume 2.5 da homoj, triono de la homaro. La oficialaj reprezentantoj de tiu triono havas privilegion ĉiam povi paroli en la denaska lingvo dum oficialaj kunvenoj, sed la reprezentantoj de du trionoj neniam havas tiun privilegion. La parolanton komparis tiun blindecon al la blindeco de homaj dum pasintaj jarcentoj kiuj ne vidis la maljuston de neagnoskado de plenaj homaj rajtoj al nigruloj, judoj aŭ al virinoj. Esperanto, kiu garantias lingvan samrajtecon al ĉiuj, progresas malrapide sed certe. La parolanto demandis kial Esperanto devus progresi pli rapide ol la kristanismo, kiu bezonis tri jarcentoj por atingi la Romian imperiestron Constantine.

Seán substrekis la tre longan mankon de lingvaj rajtoj en sia lando, Irlando. La unuaj leĝoj kontraŭ la irlanda lingvo estas de 1366, la Statutoj de Kilkenny. Unu el tiuj leĝoj postulis ke "*ĉiu anglo en Irlando devas lerni la irlandan lingvon, kaj se li rifuzas, li estos traktata kiel irlanda malamiko*" (t.e., la registaro forprenos lian bienon). En 1882 nekulpa irlandano, Maolra Seoige, estis malprave akuzita je murdo. Li ne komprenis la anglan, kaj provis sin defendi en la sola lingvo kiun li konis – la irlanda. Ĉar la angloj ne agnoskis la irlandan la sekretario de la kortumo skribis "*li diris nenion*". Kvankam du el la murdistoj ĵuris ke Maolmhuire estas senkulpa, kaj ne estis kun ili kiam ili faris la murdon, Maolra estis pendumita en Galway la 15-an de decembro 1882, dum la zamenhofa naskiĝtago!

Li finis la paroladon per kantado de la Eŭropa Himno en Esperanto – la tuta ĉeestantaro kunkantis.

Profesoro Hans-Michael Maizen, reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Vieno, parolis pri Bertha von Suttner, parolante germane kaj Esperante, kaj Chuck Smith prezentis Amikumu, Duolingvo kaj aliajn apojn en Esperanto, per Powerpoint en la germana. Komence parolis Aŭstria Esperantisto Martin Stuppnig Esperante pri sia libro, "*Home en Senhomeco*", kies germanlingvan version li prezentis al la Pola Instituto. La libro rakontis pri lia vivo en la germana armeo dum la Dua Mondmilito kaj la militkaptiteco fare de la Britoj en Egiptio.

Seán Ó Riain

## EN ZAGREB



En Zagreba biblioteko Bogdan Ogrizović, urbocentre, okazis la 12-an de decembro aranĝo por zagrebaj esperantistoj kiun organizis Kroata E-Ligo. Ĝi estis dediĉita al la zagreba parto de la projekto Multlingva Akcelilo. Unue sian laboron kadre de la projekto prezentis reprezentantinoj de la zagreba Elementa lernejo, profesorinoj Sonja Burić kaj instruistino Marina Vuković kiuj parolis pri la instruado de Esperanto al infanoj de la tria klaso laŭ la instrukcioj de la

projekto. Ili mem ne estas esperantistinoj sed entuziasmiĝis pri la afero tiel ke unu el ili eĉ komencis plian kurson en 7a klaso. Poste la tutan projekton mallonge prezentis Zlatko Tišljar kaj parolis pri la ĝisnunaj rezultoj post la duono de la projekta periodo. Intertempe Neven Mrzlečki akompane kun gitaro kantis kelkajn kantojn. Ĉeestis kvindeko da esperantistoj kaj ĉar la prezento estis publika, ĉion povis aŭdi ankaŭ regulaj vizitantoj de la biblioteko. La aranĝon gvidis Spomenka Štimec.

Pli da fotoj videblas ĉe la paĝaro www.esperanto.hr

Zlatko Tišljar

## EN MARIBOR



En Maribor okazis la 15-an de decembro aranĝo dediĉita al Zamenhofa tago por la tuta slovena esperantistaro. Ĉeestis kvardeko da personoj el deko da slovenaj urboj. La aranĝo estis unualoke dediĉita al slovena psikologo kaj influa verkisto pri la maniero kiel vivi, Martin Kojc. Li estis ankaŭ esperantisto kaj en la periodo inter dudekaj kaj kvardekaj jaroj de la 20-a jarcento verkis kelkajn tiajn librojn kiuj havis grandan sukceson. Liaj libroj estis ĉefe verkitaj en la germana kaj tradukataj. Ekz. en la nederlanda ekzistas 9 eldonoj de lia ĉefa libro »Lernolibro de la vivo«. La libron »Martin Kojc – ponto al la memkono« (en la sovena) prezentis la aŭtorino Martina Srnec. Poste Janez Zadravec prezentis lin kiel esperantiston. Ekzistas ankaŭ unu libro tradukita al Esperanto.

Poste Janez Jug parolis pri alia grava sloveno kiu okupiĝis pri internacia lingvo – Stanislav Škrabec. Fine Tomaž Longyka legis sian tradukon de poemo de slovena verkisto Anton Aškerc.

La aranĝon kune organizis Slovena E-Ligo kaj Maribora E-Societo. Pli da fotoj videblas ĉe la paĝaro de Maribora-E-societo http://esperanto-maribor.si/zam-dan-2018/

Zlatko Tišljar

# GRANDA VORTARO APERIS EN LITOVIO




Ĵus aperis *La Granda Litova-Esperanta Vortaro.* Ĝia ĉefaŭtoro estas la konata litova pedagogo, landesploristo, redaktoro, tradukisto kaj vortaristo Petras Čeliauskas, kiu bazis sian laboron sur la antaŭaj vortaroj de Konstantinas Puodėnas (1923-2009).

La vortaron eldonis Monda centro de litovoj pri kulturo, scienco kaj edukado kunlabore kun Litova Esperanto-Asocio (LEA). Ĝi estas eldonita renkonte al la venont-jara centjariĝo de LEA.

Ĉi tiu 816-paĝa vortaro, enhavanta 45 mil vortojn, estas rezulto de pli ol 30-jara ege diligenta kaj akurata laboro. Tiom ampleksa Esperanto-vortaro en Litovio ĝis nun ne ekzistis. La lastan fojon litova-Esperanta kaj Esperanta-litova vortaro de Konstantinas Puodėnas aperis en 1988 sur 288 paĝoj, kaj ĝi delonge fariĝis raraĵo, do nova vortaro en Litovio estas ege bezonata.

La vortaro estas kompilita surbaze de la akademia vortaro de la nuntempa litova lingvo, litovlingva vortaro de internaciaj vortoj kaj *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.* Estis uzitaj ankaŭ pluraj aliaj litovaj kaj Esperantaj vortaroj. En la vortaro estas prezentata la leksiko de la nuntempa litova lingvo kaj la plej ofte uzata scienca terminologio. Fine de la libro estas listo de propraj nomoj en Esperanto kaj reguloj de la Esperanta vortfarado.

La eldonkvanto de la vortaro estas 1000 ekzempleroj. Ĝin presis UAB Morkūnas ir Ko, kiu jam presis multajn Esperanto-librojn por LEA kaj por la eldonejo *Sezonoj* (Kaliningrado). La vortaron redaktis Antanas Grincevičius kaj Danutė Vidrinskienė. La aŭtoro de la kovrilo estas Virginija Jokubkaitė.

La unua litova-Esperanta vortareto, nur 80-paĝa, aperis en 1921. Balys Giedra kaj Petras Lapienė en 1940 estis preparintaj Plenan litovan-Esperantan vortaron (ĉ. 35 mil vortoj ), ĝi estis transdonita al presejo, sed la Sovetunia okupacio neniigis ĉi tiun grandiozan laboron. Nur post dudek jaroj en 1960 estis eldonita malpli vasta litova-Esperanta vortareto de Stasys Sabalis (ĉ. 5 mil vortoj, 15 mil ekz.). Poste pri vortaroj okupiĝis ĉefe Konstantinas Puodėnas. En 1988 estas eldonita lia anbaŭflanka Esperanta-litova kaj litova-Esperanta vortaro (40 mil ekz.), redaktita de Adomas Vaitilavičius. Ĝia dua parto ampleksis 195 paĝojn (ĉ. 15000 vortoj).

Konstantinas Puodėnas preparis ankaŭ malnetan tajposkripton de pli vasta litova-Esperanta vortaro, kiun tamen necesis esence refari, korekti, redakti, ampleksigi. Tamen tiu malneto faciligis la preparadon de la ĵus eldonita vortaro. Tial Konstantinas Puodėnas estas traktata kiel kunaŭtoro de la nova vortaro.

La vortaron eblas aĉeti en la Monda centro de litovoj pri kulturo, scienco kaj edukado (Kaŭno, str. Daukanto 11), en la libroservo de LEA (Kaŭno, str. Zamenhofo 5) kaj rete https://leidiniai.plc.lt. Ĝi kostas 25 eŭrojn.

Povilas Jegorovas

# LA VENONTA HISPANA KONGRESO

La kongreso okazos en la urbo **Malago** de la **1-a ĝis la 5-a de majo 2019**, parte kune kun la kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio), kiu disvolviĝos de la 3-a ĝis la 9-a de majo.

Jam eblas aliĝi. La kongresa retpaĝo estas:
https://esperanto-andalucia.info
Nia Ponto (Bilbao)

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**
Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.
Finredaktita: la 31-an de decembro 2018
Redaktoro: Zlatko Tišljar
En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Elda Doerfler, Peter Baláž, Povilas Jegorovas, Katalin Kovats, José Antonio del Barrio, Seán Ó Riain, Nia Ponto (Bilbao)

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com
Retpaĝo: http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno

Eŭropa Esperanto-Unio
Por efika kaj maldiskriminacia komunikado
www.europo.eu